

## Mulieris dignitatem

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 7-an de junio 2017

### Enkonduko

Papo Johano Paŭlo la 2-a, propranome Karol Józef Wojtyła (1920-2005), estis la unua slava papo en historio, la papo, kiu signife influis ŝanĝojn de reĝimoj nia lando. Danke al li ni estis sanktigitaj du virinoj: Sankta Agnes Primislidino (1211?-1282) kaj Sankta Zdislava el Lemberko (1220-1252), kaj unu viro: Sankta Johano Sarkander (1576-1620).

La 15-an de aŭgusto 1988 Johano Paŭlo la 2-a verkis sian enciklikon *Mulieris dignitatem* (Pri Dignecon de Virino). Li korespondis kun vidpunktoj de siaj antaŭuloj, la papoj Pio la 12-a, Johano la 23-a kaj precipe Paŭlo la 6-a.

### Virino – Patrino de la Dio

Apostolo Paŭlo en sia epistolo al Galatoj skribas, ke „**kiam venis la pleneco de la tempo, Dio elsendis Sian Filon, el virino naskitan**“ (Gal 4, 4). Tio estis baza punkto de historio de savo de homaro. Virino Maria akiris tiel grandan kunligon kun la Dio, kiun neniu ŝia antaŭulo kapablis akiri. Malnova Testamento, kiu postulis kredon je unusola Dio, tion ne atendis, sed „**ĉio estas ebla ĉe Dio**“ (Mar 10, 27).

La virino, kiu reprezentas la homaron, estas avancigita pro sia patriniĝo. Tio donas al la virino ŝian dignecon. Nur patrino povas doni vivon al infano. Tial la Virgulino el Nazareto fariĝas patrino de la Dio. En la jaro 431 koncilo en Efeso proklamis tiun ĉi veron. Maria volonte akceptis volon de la Dio, tial ŝi akiris plenan kunligon kun Li, fariĝis gracioplena. Ŝi estis modesta dirante „**Jen la sklavino de la Eternulo; estu al mi laŭ via diro**“ (Luk 1, 38). Tial ŝi envinciĝis en savantan servicon de Kristo.

### Bildo de la Dio kaj Lia simileco

La Kreinto kreis la unuajn homojn. „**Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino li kreis ilin.**“ (Gen 1, 27). La homo estas same la viro kiel la virino.

Origine la unua viro Adam estis sola, „**por la homo ne troviĝis helpanto simila al li**“ (Gen 2, 20), tial la kreon de la virino li bonvenigis dirante: „**Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno de mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita.**“ (Gen 2, 23). Viro kaj virino estas „**unuiĝo de du personoj**“. En la Biblio estas la unuiĝo, edzeco, baza kondiĉo por transdono de la vivo al posteuloj, novaj generacioj.

„**Ne estas bone, ke la homo estu sola.**“ (Gen 2, 18). Viro kaj virino devas helpi unu al la alia. La edzeco, en kiu unu homo vivas por la alia, estas baza komunumo de la homaro. Ili ambaŭ, viro kaj virino, estas gepatroj.

### Eva – Maria

En la 3-a ĉapitro de la libro Genezo estas priskribita, ke la homo, kiu estis kreita en stato de sankteco, kaŭze de influoj de malbona spirito (diablo-serpento) misuzis sian liberecon, ekribelis kontraŭ la Dio kaj eksopiris akiri celon de sia vivo ekstere la Dio.

La homo estas libera. La homo povas uzi sian liberan volon por elekto de bono, sed ankaŭ povas misuzi la liberecon por elekto de malbono. La peko (elekto de la malbono) kontraŭdiras al intenco de la Dio, kiu volis doni al viro kaj virino feliĉon. La homo pekis volante esti kiel la Dio, sendepende je la Dio decidi, kio estas la bono kaj kio estas la malbono. Tiel la homo rompis originan unuecon kun la Dio. Sed ankaŭ la rilato de viro kaj virino kaŭze de la unua peko jam ne estis tiel bela kiel antaŭe: „**...kaj al via viro vi vin tiros, kaj li regos super vi.**“ (Gen 3, 16). Jes, ni vidas, ke partneran rilaton anstataŭas **regado**

**de la viro super la virino.** Tion ni neniam devas akcepti kaj permesi. La virino neniam devas fariĝi „objekto“ de „regado“ kaj „proprieto“ de la viro!

Sed en la libro Genezo oni trovas ankaŭ la vortojn: **„Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon.“ (Gen 3, 15).** Vidu bone, ke en la Biblio oni ne parolas pri la idaro de la viro, sed pri la idaro de la virino. En tiu ĉi sentenco estas antaŭdirita batalo inter la homaro kaj la diablo. Kaj ĉefan rolon ludas la **virino**. La virino estos patrino de la Dio, nia Savanto. Maria estas atestantino de nova komenco. Eva la Dion ne obeis, Maria volonte obeis – tial ŝi renovigis belan rilaton inter la Dio kaj la homaro: **„Ne estas ja judo nek greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.“ (Gal 3, 28).** La Dio-Filo prenis super Li homan naturecon kaj fariĝis simila al homo, sed neniam pekis. (Heb 3, 15). Danke al Maria Eva denove trovas **dignecon de virino**.

### **Jesuo Kristo**

Filo de la Dio estis **defendanto de la digneco de virino**. Li kondukis alie ol liaj samaĝuloj. **„... ili miris, ke li parolas kun virino.“ (Joh 4, 27).** Jesuo Kristo batalis kontraŭ la tradicioj, kiuj diskriminis virinojn!

Li sanigis virinojn, kiuj estis malsanaj, ekzemple la virinon, kiu **„dum dek ok jaroj havis spiriton de malforteco; kaj ŝi estis kunkurbita kaj neniel povis leviĝi“ (Luk 13, 11),** bopatrino de Simon, kiu **„kuŝis malsana de febro“ (Mar 1, 30),** la virinon, kiu **„jam dek du jarojn havis sangofluon“ (Mar 5, 25).** Li revivigis filinon de sinagogestro Jairo dirinte al ŝi: **„Knabino, mi diras al vi: leviĝu.“ (Mar 5, 41).** Virino Kanaana petis lin resanigi sian filinon. Jesuo Kristo estimis grandan kredon de patrino per la vortoj: **„Ho virino, granda estas via fido; estu al vi, kiel vi volas.“ – „Kaj ŝia filino estis sanigita de post tiu horo.“ (Mat 15, 28).**

La vidvino, kiu donis en templan monkeston **„du leptojn“** (sian tutan vivrimedon), estis pli bone estimita ol la riĉuloj, kiuj nur **„el sia abundo enĵetis“ (Luk 21, 1-4).**

En tutaj instruado kaj konduto de Jesuo oni povas trovi neniun diskriminon de virinoj. Li per siaj vortoj kaj agoj ĉiam esprimas respekton kaj estimon, kiuj apartenas al virinoj.

Pekantino, kiu alvenis en domo de farizeo, priverŝis piedojn de Jesuo per siaj larmoj kaj viŝis ilin per la haroj de sia kapo. Kiam la farizeo skandaliĝas kontraŭ tio, Jesuo al li eksplikas: **„Ŝiaj pekoj, kiuj estas multaj, estas pardonitaj; ĉar ŝi multe amis...“ (Luk 7, 47).**

La plej elokventa estas renkontiĝo de Jesuo ku la virino, kiu estas kaptita adultante. Farizeoj volas ŝin ŝtonmortigi. Jesuo respondas al ili: **„Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝi ŝtonon.“ (Joh 8, 7).** Hontigitaj farizeoj eliris **„unu post alia, komencante de la plej maljunaj“,** restis nur **„Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. Kaj Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? ĉu neniun vin kondamnis? Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro. Jesuo diris al ŝi: Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku.“ (Joh 8, 9-11).**

Kristo scias dignecon de homo, lian valoron. Ĉiu virino estas heradantino de persona digneco, kiu apartenas al ŝi kiel al la virino.

La afero pri adultinta virino ankaŭ montras, ke la virino publike suferas de sia peko, dum la viro, kiu kunkaŭzis la pekon, estas kaŝita malantaŭ „peko de virino“, eĉ li hipokrite ludas rolon de akuzisto. Ne nur la virino, sed ankaŭ la viro havas respondecon je digneco de la virino.

Jesuo Kristo instruas virinojn pri ilia digneco. La virinoj vidas, ke Jesuo parolas kun ili pri aferoj, pri kiuj en tiu tempo neniam viroj kun virinoj diskutis.

Proksime samaria urbo Siĥar Jesuo renkontiĝis la virinon Samarian. Li sciis, ke ŝi estas pekantino, eĉ diris tion al ŝi. Sed krom tio li parolis kun ŝi pri donaco de amo de la Dio, kiu estas kiel la **„fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo“ (Joh 7, 14).** Virino,

kaj eĉ pekantino, fariĝis lernantino de Kristo, kaj eĉ kaŭzis, ke aliaj Samarianoj ekkredis je Kristo. Tio estis granda novaĵo.

Signifan rolon en la Evangelio ludas Maria kaj Marta, fratinoj de Lazar. Jesuo estas ilia gasto kaj parolas, Maria lin atenteme aŭskultas, dum Marta zorgas nur pri lia komforto, pri ordinaraj hejmaj aferoj. Jesuo pli estimas la aŭskultantinon ol la hejmmastrinon.

Post morto de Lazar ankaŭ Marta interparolas kun Jesuo: „**Sinjoro, se vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta.**“ – „**Via frato releviĝos.**“ **Marta diris al li: mi scias, ke li releviĝos ĉe la releviĝo en lasta tago. Jesuo diris al ŝi: Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos. Ĉu vi tion kredas? Ŝi diris al li: Jes, Sinjoro, mi jam kredas, ke vi estas la Kristo, la filo de Dio, la venanta en la mondon.**“ (Joh 11, 21-27).

Dum malbona tempo de krucumado de Kristo virinoj estis pli fortaj ol viroj. Sub kruco staris nur unu viro, la disĉiplo Johano, sed tri virinoj: „**lia patrino, kaj la fratino de lia patrino, Maria, edzino de Klopas, kaj Maria Magdalena.**“ (Joh 19, 25).

Post reviviĝo de Jesuo la unua homo, kiu renkontiĝis lin, estis Maria Magdalena.

### **Patriniĝo kaj virgeco**

La virgeco kaj patriniĝo estas du dimensioj de virina personeco.

### **Eklesio – fianĉino de Kristo**

En la Epistolo de sankta Paŭlo al la Efesanoj estas bazaj vortoj por kompreno de rilato de Kristo al eklezio:

„**Edzoj, amu viajn edzinojn, kiel Kristo amis la eklezion kaj pro ĝi sin donis, por ke sanktigu ĝin per akvolavo, kun la vorto, por ke li starigu ĝin antaŭ si glora eklezio, ne havanta makulon, nek malglataĵon nek ion tian, sed por ke ĝi estu sankta kaj sendifekta. Tiel same devas edzoj ami siajn edzinojn kiel siajn proprajn korpojn.**

**Kiu amas sian edzinon, tiu amas sin mem; ĉar oni neniam sian propran karnon, sed nutras kaj prizorgas ĝin, kiel ankaŭ la Sinjoro la eklezion; ĉar ni estas membroj de lia korpo. Tia viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili du estos unu karno.**

**Ĉi tiu mistero estas granda, sed mi parolas pri Kristo kaj la eklezio.**“ (Efe 5, 25-32).

Kristo estas Fianĉo, Eklezio estas Fianĉino de Kristo.

### **La plej granda estas la amo**

En menciita Epistolo de sankta Paŭlo al la Efesanoj, en kiu la rilato inter Kristo kaj eklezio estas prezentita kiel la rilato inter Fianĉo kaj Fianĉino, koncernas ankaŭ de edzeco. La Fianĉo estas tiu, kiu amas, la Fianĉino estas tiu, kiu estas amata, por ke reciproku la amon. La virino ne povas trovi sin mem alie, nur per donacado de la amo al aliuloj.

En la libro Apokalipso la virino estas „**vestita per la suno, kaj la luno sub ŝiaj piedoj, kaj sur ŝia kapo krono el dek du steloj**“ (Apo 12, 1) (**Bildoj 1-4**). Samtempe ŝi estas graveda, suferas antaŭ nasko kaj estas endanĝerata de „**la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano, la trompanto de la tuta mondo**“ (Apo 12, 9). Ni povas diri, ke en biblia modelo de la virino estas prezentita batalo de homo kontraŭ malbono, la batalo por vera bono kaj savo.

Morala forto de la virino baziĝas sur respondeco por homo. Tial atentema legado de la Biblio konfirmas pri kio dependas digneco kaj vivodevo de la virino.

## Literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Pismo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [Biblio. La Malnova kaj Nova Testamento kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥlingve]
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G.Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [esperantlingve]
- BERVELING, G. (2015): La dua prediko dum UK en Lille 2015. – Dia Regno, 5: 102-104.
- COUSSON, P. (2015): Dialogo apud la puto. – Dia Regno, 5: 99-101.
- FROSSARD, A. (1988): Portrét Jana Pavla II., 1-a eld., Prago, Zvon, 96 paĝoj.
- JAN PAVEL II. (1992): Mulieris dignitatem. Apoštolský list papeže Jana Pavla II. O důstojnosti a povolání ženy u příležitosti Mariánského roku. 1-a eld. Zvon, české katolické nakladatelství, Praha, 73 paĝoj.
- RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Á. (2015): Ekumena kongreso en Strasburgo 2015. „Donu al mi trinki“ (Johano 4, 7). – Dia Regno, 4: 80-86.

**Bildo 1**

**Statuo de Virgulino Maria en Telč**



**Bildo 2**

**Statuo de Virgulino Maria en Svitavy**



**Bildo 3**

**Statuo de Virgulino Maria en Valašské Meziříčí**



**Bildo 4**

**Statuo de Virgulino Maria en Havlíčkův Brod**

